W. Bormann

# KONJUNKTUR-POLITIKO

Dr. Werner Bormann

# *Inter senlaboreco kaj inflacio*

Priskribo de la konjunkturpolitiko

Studhelpilo por lekciaro dum la
6-a Sanmarina Universitata Semajno (SUS 6)
dum aŭgusto kaj septembro 1989 de la
Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS)
- en kiu la aŭtoro kunlaboras kiel
Asociita Docento -

Eldonita kiel labormaterialo de la aŭtoro

Antaŭrimarko

Kiam mi studis en la 50-aj jaroj, la instalitaj profesoroj uzis kiel sian klarigon pri *konjunkturo* la kvantoteorion de la mono. Sed jam atingis nin el eksterlando la teorio de Keynes kun ĝia akcento sur intervenismo por konduki la nacian ekonomion al bona *konjunkturo*. Kaj estis la jaroj de disputo inter kapitalismo kaj marksismo, ĉi-lasta kun sia venkemo pro asertita neregeblo de la *konjunkturo* en okcidento.

En la 60-aj kaj 70-aj jaroj mi instruis ekonomikon en fakuniversitato. Samtempe kaj poste mi laboris pri ekonomio en ministerio. Mi do ĉiam okupiĝis pri *konjunkturo*. Studado, instruado, daŭra informiĝo kaj leĝlaboro okazis en mia gepatra lingvo, la germana. Neeviteble konatiĝis iuj anglaj terminoj.

Preparante lekciojn por la Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino mi devis
- ĝisdatigi kaj ordigi miajn ideojn pri *konjunkturo*,
- kapabligi min trakti ĉion en la Internacia Lingvo Esperanto.

Tiu laboro pri terminoj estis ampleksa sed ege interesa kaj finfine kontentiga,

Verki nove pri fako, tio ne estas afero de neologismoj. Nur necesas fiksi ĉe ekzistantaj vortoj ilian fakan signifon. Tiam ĉiu fakulo ĉie ajn same komprenas pri kio temas. Por tiu tutmonda sameco zorgas bonaj vortaroj kun difinoj.

Unua kaj ĉefa informfonto estas Plena Ilustrita Vortaro (mallongigo: PIV), kaj por la fako ekzistas la Internacia Komerca-

Ekonomika Vortaro en naŭ Lingvoj (en tiu ĉi teksto mallongigita al: 9-lingva).

Mi provizis mian tekston el ambaŭ verkoj, rigardante ankaŭ sed malofte en kelkajn aliajn lingvohelpilojn. Plej ofte mi uzis la naŭlingvan vortaron pri komerco kaj ekonomiko, en kiu, cetere, mi mem kunlaboris siatempe. Giajn terminojn mi citis abunde kun iliaj difinoj. Tio estu kontribuo al la stabiligo de la ekonomika terminologio.

Diplom-Ekonomikisto
Dr. Werner Bormann
(adreso: Schärstr. 26
D-2050 Hamburg 80
Fed.Resp.Germanujo)

La ĉapitroj:


| | | paĝo |
|---|---|---|
| 1 | ekonomio kaj konjunkturo | 5 |
| 2 | senlaboreco | 19 |
| 3 | stadioj de konjunkturo | 22 |
| 4 | hipotezo pri krizo | 26 |
| 5 | politiko kiel influilo | 34 |
| 6 | psikologiaj klopodoj | 39 |
| 7 | monpolitiko | 40 |
| 8 | eksterlandkomerca politiko | 45 |
| 9 | buĝeta politiko | 48 |
| 10 | efikecoj de la rimedoj | 54 |

# 1 EKONOMIO KAJ KONJUNKTURO

111 la temo apartenas al la kampo

*e k o n o m i o*

- ekonomio (9-lingva: "la situacio de komunumo aŭ ŝtato el la vidpunkto de ĝia riĉeco kaj materia prosperado") havas la celon

- disponigi al la homoj ĉion necesan por la vivtenado

- se iel eble provizi bonfarton al la homoj

  * kio estas bonfarto?

    - ke varoj (9-lingva: "laŭ ekonomia vidpunkto varoj estas ĉiuj materiaj kaj nemateriaj aĵoj kiujn oni povas uzi por kontentigi bezonojn. Do ankaŭ servojn oni rigardas varoj") estu sufiĉaj, variaj, kvalitaj, diversaj ...

      + materia aĵo = produkto, produktaĵo (9-lingva: "la rezultato de produktado: sukero estas multe uzata produkto")

      + servoj (9-lingva: "estas rimedoj por kontentigi materiajn kaj spiritajn bezonojn. Oni ofte nomas lin nemateriaj aĵoj, ĉar en interŝanĝado ili estas ĉefe submetitaj al la samaj leĝoj kiel la materiaj aĵoj rilate valoron kaj prezon")

    - sufiĉeco = kvanto! La kvanto, kaj pri kiuj detaloj temas, estas decida:

= kiam estas multe je dispono = bone
= kiam regas rara oferto = malbone

112 science la temo apartenas al la

*e k o n o m i k o*

(9-lingva: "estas scienco kiu havas la taskon priskribi, klarigi kaj apliki la leĝojn aŭ laŭleĝecojn kiuj ekzistas en la interligoj inter la diversaj ekonomiaj fenomenoj. Ĉi-rilate oni parolas pri priskriba, teoria kaj aplikata ekonomiko")

113 la temo traktas fenomenojn el la

*makroekonomiko*

(9-lingva: "studado de la ekonomia sistemo kiel tuto, speciale rilate al ĝia ĝenerala nivelo de produktado kaj enspezado, kaj la rilatoj inter sektoroj de la ekonomio")

12 Ekonomio estas multfaceta fenomeno

* ĝi ne estas ĉiam samstata

- foje homoj fartas bone
  = la kvanto da disponeblaĵo estas granda
    = la valoro de la tuto estas alta

- foje homoj suferas mizerecon
  = la kvanto da disponeblaĵoj estas eta
    = la valoro de la tuto estas malalta

- inter tiuj statoj okazas
  # pliboniĝadoj
  # malfavoriĝoj

* ke la "eterna bontempo" (per aliaj vortoj: la paradizo) ne ekzistas, ŝuldiĝas al problemoj, kiuj estas integraj partoj de ĉ i u e k o n o m i o , tieldire ekonomiaj malsanoj, ekz:
  - senlaboreco, inflacio, mizerregionoj, malmoderneco

  Diversaj kaŭzoj por neatingo de bonfarto:

  - ke la ordo ne estas ĝusta
    = rimedo: klopodoj pri taŭga ekonomia ordo

  - ke la strukturo ne estas adekvata
    = rimedo: klopodoj pri harmonia strukturo

  - ke la teknologio ne estas moderna
    = rimedo: klopodoj pri novaĵoj

  - ke la regionoj ne evoluas sampaŝe
    = rimedo: klopodoj pri regiona egaligo

  - ke la importo superas la eksporton
    = rimedo: ekvilibro en eksterlanda komerco

  - ke la prezoj forte grimpas
    = rimedo: bremsi la inflacion

  - ke homoj ne trovas laborlokon
    = rimedo: kontraŭi senlaborecon

13 La alternado inter bonaj kaj mizeraj tempoj ripetiĝas.

* La evoluo estas ondoforma. Ekzistas

  - longaj ondoj kaj

  - mallongaj ondoj. Ili estas la rimarkebla ŝanceliĝo de la ekonomio. Tial ili estas pli okulfrapaj. Tiuj mallongperiodaj ondoj havas amplitudon inter proksimume kvar kaj naŭ jaroj. Por ili la termino: k o n j u n k t u r o (9-lingva: "ciklo de florado kaj malflorado de la ekonomia vivo kiel tuto aŭ de ĝiaj eroj, en ekonomio bazita sur libera interŝanĝo de varoj kaj servoj. La konjunkturo speciale esprimiĝas en la rilatoj inter la merkatoj")

* kio moviĝas ondoforme tra la jaroj? la ekonomia aktiveco, la produktitaj kvantoj, la nombro de okupitaj laborlokoj, sume: la ekonomio.

  - kiam la aktivado brulas, ankaŭ la prezoj grimpas, tio nomiĝas i n f l a c i o (UNU EL LA DU TITOLVORTOJ)

  - kiam anstataŭ aktivado regas stagnado, tiam ekzistas s e n l a b o r e c o (LA ALIA EL LA DU TITOLVORTOJ)

  - interrilatoj: aktivado, ekonomia kreskado kunportas sian malŝatatan akompanaĵon <u>inflacio</u>, ĝin bremsi

signifas malkreskon kun ĝia malbeno de senlaboreco, kaj inverse, la alproksimiĝo al unu celo kaŭzas lezon de la alia; tria elemento en tiu antagonismo: ekvilibro en eksterlanda komerco, la "naciekonomia triangulo",

14 la problemo: kiel mezuri kvantojn el diversaj aĵoj? Adicii panon kaj riparojn kaj ŝuojn kaj kuracadojn?

- bezonata estas komuna mezurilo
  = ilia valoro
    = ilia ekvivalento en mono; tial en tiu ĉi lekciaro tre ofte temos pri mono
    = iliaj prezoj

temo: MONO

* La ekonomia kunvivado okazas sur merkatoj. Tie la varoj havas siajn prezojn. Ili esprimiĝas en mono, kaj ĉiuj pagas en mono. Ankaŭ la alteco de la konjunkturo havas monon kiel mezurunuon.

* Ĉio produktita en lando, ĉu varoj (produktaĵoj) ĉu servoj, estas la rezulto de la faritaj laboroj. Tiu kvanto estas la esprimilo de la nacia klopodado en ekonomio. Ĝi estas la

* nacia produkto/nacia enspezaro:

  - La signifo de la *malneta nacia produkto (MNP)* kaj kio ĝi estas (detaloj en "Eksterlanda Komerco") (9-lingva [tie uzata "brutta nacia produkto"]: la

totala valoro de varoj kaj servoj faritaj en nacio dum difinita periodo, ekz. jaro, ankaŭ inkluzivanta la totalon de elspezoj fare de konsumantoj kaj registaro plus la malnetan ("bruttan") privatan investaron")

* ekzistas do ankaŭ *neta nacia produkto,* (9-lingva: "la neta valoro de varoj kaj servoj faritaj en nacio dum difinita periodo, ekz. jaro, kiun oni kalkulas, malpliiganta la malnetan [bruttan] nacian produkton per amortizo de investaĵoj (kapitalobjektoj") ("amortizi" havas plurajn difinojn, 9-lingva: (1) "nuligi ŝuldojn per pagoj", (2) "administracie redukti periode la valoron de konstruaĵoj, maŝinoj, aktivaj ŝuldoj ktp, sekve de normala eluziĝo aŭ ekonomia perdo" - en tiu senco ankaŭ "deprezi", (3) "pri obligacia prunto: nuligi la prunteprenon, periode indikante per lotado la obligaciojn, kiujn oni retiros kontraŭ pago", kaj en PIV (1) "nuligi ŝuldon per regulaj (monataj aŭ jaraj) partopagoj", (2) "en la jaraj kontoj de entrepreno aŭ eĉ de privatulo, kalkuli la malplivaloriĝon de elementoj de kapitalo laŭ ilia probabla daŭro")

- alia tre ĝenerala indikilo por la stato de nacia ekonomio: la *nacia enspezaro* (9-lingva: "konsistas el la valoro de ĉiuj varoj kaj servoj produktitaj dum difinita periodo (jaro) inkluzive de importo, reduktita per la kostoj de produktado kaj importado"

<u>temo: MONVUALO</u>

labori per monunuoj signifas ankaŭ malklarigi la bildon. Kion volas la homoj? Realajn kvantojn de io konsumebla! Kaj ne iliajn monajn ekvivalentojn.

- 1 tabuleto da ĉokolado,
  pezo 100 gramoj, prezo 1 marko

- el tiu marko fariĝis 1,10 markoj.
  Malantaŭ tio:
  a) 110 gramoj da ĉokolado, t.e.
     inflacio 0, efektiva plibonfarto
  b) 100 gramoj restis, sed la tabuleto
     plikostiĝis, do inflacio
  en ambaŭ kazoj la MNP kreskis

- por ĝisvidi la veran situacion,
  necesas disŝiri la "monvualon"

Kiam la afranko de unu presaĵo en la komenco de la periodo estas 1 monero kaj poste 1,05 aŭ eĉ 2 aŭ 3 moneroj, la evoluo restas en kompareblaj ciferoj. Sed kiam tiu ĉi afranko kreskis ĝis 1000 aŭ 10.000 moneroj, ne plu eblas dedukti el tiu ciferĉeno racian konstaton. Ĉio restas malantaŭ la monvualo.

15 krom konjunktura ondado ekzistas ankaŭ tre longperiodaj cikloj

* la longaj ondoj

  - amplitudo proksimume 50 jaroj
    = 15 jaroj de pliboniĝoj
    = 15 jaroj de alta nivelo
    = 15 jaroj de problemoj

- unue konstatitaj de Nikolai Kondratieff, Moskva Instituto por Konjunkturesplorado, 1926, tial ilia nomo "Kondratieff-cikloj" (li mortis en Siberio 1930)

- popularigita i.a. de Schumpeter: La dinamisma entreprenisto kiel pioniro de la ekonomia evoluo

- ne fenomeno de unu lando, sed afero de la tuta mondo

* ĝiaj cikloj

  - levo de la ekonomia nivelo: novaj teknikaj eltrovaĵoj kun principa signifo, novaj merkatoj en la mondo, t.e. nove riĉiĝantaj landoj, pozitiva sinteno, intensa entreprenista aktivado

  - pliakriĝanta konkurenco: inflacio kiel konsekvenco de la bona periodo, kreskantaj kreditoj por kreskantaj investoj, troaj kapacitoj pro la ne plu daŭranta kresko, falo de profitoj

  - depresio: bankrotoj, borso-"kraŝoj", (9-lingva: "ruiniĝo de komerca firmo aŭ banko, kiu [kio] ofte kuntrenas aliajn, tiel kaŭzante krizon"), malpliiĝantaj investoj, protektismo en eksterlanda komerco, subvencioj kreskas kaj komplikigas ĉion, pesismisma sinteno, profetoj pri mondpereo

  - resaniĝo: alĝustigo de la ekonomio (kapacitoj, salajroj) al la nova

situacio, malaltigo ankaŭ de kostoj kaj raciigo (germane: Rationalisierung), 9-lingva: "estas plejeble favora organizo de la produktado en plej vasta senco, kun la celo atingi pli altan produktivecon de kapitalo kaj laboro"), apero de espero pri la estonteco, novaj iniciatoj, esplorado kaj teknologio efikas

- kreiĝis nova bazo de ekonomio mondvaste, ŝtupo pli alta ol antaŭ la ĵus okazinta Kondratieff-ciklo

* en la realeco

  - 1789 ĝis 1848, unue novaj teknikaĵoj: vapormaŝino, mekanika tekstilo (la unua "industrio"!), karbo kaj fero; poste malbonaj tempoj, malsato, fino: la ideoj de Karl Marx; ĉeflando Britujo

  - 1848 ĝis fino de jarcento (1895), unue la fervojo, ŝtalo, telegrafio, ĉeflando Germanujo, fino: malgaja humoro "fin de siecle" = franclingve/ tiam ĉeflingvo: "fino de'l jarcento"

  - jarcentŝanĝo (1895) ĝis Dua Mondmilito (1939/1945): novaj teknikaĵoj: kemio, elektrotekniko, telefono, aŭto; ĉeflando Usono; unue la homoj parolis pri "belle epoque" = franclingve "bela epoko", poste la "monda ekonomia krizo" estiĝinta en Usono en 1929 kaj disvastiĝinta ĉien

  - 1945 ĝis ?? teknikaj varoj portantaj la leviĝon: atomo, amasa aŭtouzado,

aviadiloj, mastrumaj aparatoj, nafto, komputiloj, elektroniko, komunikiloj, la "oraj sesdekaj jaroj"; post tiu florado venis periodo de ŝanceliĝoj, unue studentaj ribeloj 1968, naftokrizo 1973, esencaj problemoj de pluraj landoj: "kreditokrizo" (en Brazilo, Meksikio, Pollando ktp) kaj obstina senlaboreco; ne plu unu ĉeflando, sed pluraj mondaj centroj (Usono, Japanujo, okcidenta Eŭropo); se estas nun cikla krizo, tiam ĝi estas pli facile eltenebla pro la "reto de la sociala sekureco"

- nova ciklo supren? ekde proksimume 1995? novaj eltrovaĵoj ekzistas: mikroelektroniko (komputilo), genteknologio, spacveturado, amasturismo, reordigo de la malpurigita medio (ekologiaj rimedoj); landoj? tiuj ĉirkaŭ la pacifika oceano? daŭranta signifo de okcidenta Eŭropo (i.a. pro Eŭropaj Komunaĵoj)?
  = oni ja nur poste scias, kiam historia ŝanĝo estis okazinta, ne ne kiel samtempa atestanto!

17 kaŭzoj de oscilanta evoluo

* konjunkturteorioj

  - troproduktado [aŭ superproduktado] (9-lingva: "estiĝas kiam ne eblas vendi la tutan kvanton da produktoj, ekzemple sekve de malpliiĝo de la postulado")
    = Usono "nigra vendredo" en oktobro 1929, la granda kraŝo

- subkonsumado (9-lingva: "estas nocio kiun uzas diversaj konjunktur-teoriistoj kiel indikon de la kaŭzo de transiro de alta konjunkturo al depresio. Ili opinias ke la plivastigo de la kapablo produkti konsumproduktojn estas troigita dum la alta konjunkturo, do ke ĝi ne estas konforma al la fakta kaj ebla pligrandiĝo de postulado de tiuj produktoj. Laŭ ĉi tiu vidpunkto subkonsumado do ne estas sekvo de malpliiĝo de postulado, sed de troa grandiĝo de la proponado")

- klarigoj el la monteorio

- klarigoj el la marksisma idearo (vidu ciferon 4)

* klarigoj en rilato al la teorioj pri cirkulado en la ekonomio (9-lingva: "ekonomia cirkulado: la interligoj inter la diversaj manieroj laŭ kiuj varoj kaj servoj interŝanĝiĝas en la socio")

  - dinamika (PIV, oficialigita en listo n-ro 2) evoluo kun ne ĉiam harmoniaj interrilatoj

    - preznivelo dependa de

      + *postulado* (9-lingva: "la kvanto da varo postulata en merkato je difinita prezo. En kazo de ĉiu alia prezo oni postulas alian kvanton kaj ĝenerale estas vere ke malpli alta prezo elvokas pli grandan") kaj

+ *proponado* (9-lingva:"la kvanto da varo proponata en merkato je difinita prezo. Ĉe ĉiu pli alta aŭ malpli alta prezo oni proponas alian kvanton kaj ĝenerale ĉe pli alta prezo la proponado estas pli granda") sur la merkatoj *pri varoj kaj priservoj* (la termino ne estas *ofertado*, oferto, 9-lingva: "la ago proponi varojn aŭ servojn, kutime en la formo de letero, cirkulero aŭ anonco. Ĝenerale karakterizas la oferton la fakto ke la aĉeto efektiviĝas tuj kiam la aĉetanto akceptas la oferton, tiel ke la ofertanto ne rajtas ŝanĝi siajn kondiĉojn")

~ postulado unuflanke dependa de enspezoj: salajroj (9-lingva: "estas la kompenso kiun ricevas aŭ rajtas ricevi tiu kiu sin devigas fari laboron"), pensioj (9-lingva: "estas regula monpago komenciĝanta ĉe atingo de difinita aĝo aŭ ĉe invalideco, ankaŭ kiam ĝi kiel rajto ne estiĝas el antaŭa laboro aŭ dungiteco") kaj rentoj (9-lingva, difino n-ro 2 "kompenso kalkulita laŭ procentoj kaj daŭre pagota krom la ĉefa ŝuldo de ŝuldanto") kaj aliflanke de la inklino al konsumado ("konsumado", 9-lingva: "estas kontentigo de bezonoj akompanata de foruzo de aĵoj kaj servoj. En konsumado ĉiuj produktivaj faroj trovas sian finan celon. La parto kiun la konsumanto povas akiri al si en la totala konsumado dependas ne

nur de liaj bezonoj, sed speciale de la kiomeco de liaj enspezoj")

- proponado dependa *de varoferto kaj kostoj*

- enspezoj de konsumantoj dependaj de la kostoj de entreprenoj

- varoj dependaj de teknika progreso (Karl Marx: ĝi pelas la ekonomian evoluon antaŭen!)

- ĉio dependa de eksterlandaj influoj (detaloj en "Eksterlanda Komerco")

- mono dependa *de kvanto kaj cirkulrapideco*

- monmerkato (kapitalmerkato) dependa de interezoj

- interezoj dependaj de prefero por likideco (9-lingva: "ĉi-kaze oni parton de la enspezoj kiun oni ne tuj konsumas konservas en la formo de kasstoko [moneroj, bankbiletoj] aŭ kreditaj saldoj ĉe bankoj, preferante ĉi tion al investado en haveroj kiuj havigas enspezojn, ekzemple biloj")

  > "likidaĵoj" estas laŭ 9-lingva "tiuj rimedoj kiun oni povas ĉiam konverti en kontantan monon, ekz. tratoj, ĉekoj kaj tuj enkasigeblaj aktivaj ŝuldoj"

  > "likideco" laŭ 9-lingva "estas la grado laŭ kiu privata persono

aŭ entrepreno disponas likidaĵojn propocie al la tuj pagendaj ŝuldoj")

- investoj dependaj *de interezoj kaj ŝparado* (9-lingva: "investaĵoj = daŭremaj produktiloj: konstruaĵoj, maŝinoj, instalaĵoj ktp rekte destinitaj al produktado kaj nerekte al konsumado")

- ŝparado dependa de enspezoj

- kaj tiel plu

## 2 SENLABORECO

21 La konjunktura fluktuo respeguliĝas ankaŭ en la gradoj de senlaboreco.

* difinoj de senlaboreco:

  - konjunktura senlaboreco (9-lingva: "estiĝas sekve de krizo kaj ofte estas akra kaj ampleksa")

  - sezona senlaboreco (9-lingva: "estas la perioda senlaboreco de laboristoj en entreprenoj kie la disponebla laboro dependas de la sezono")

  - struktura senlaboreco (9-lingva: "estiĝas kiel sekvo de ŝanĝiĝoj en la ekonomia strukturo")

  - frikcia senlaboreco (9-lingva; "nedaŭra senlaboreco sekve de ŝanĝoj de laborlokoj, malekvilibro de produktofaktoroj, aŭ nelongdaŭra manko de labormoveblo, kiuj malebligas seninterrompan dungitecon")

22 La atingota bona stato en la konjunktura fluktuo estas la plena dungiteco

(9-lingva: "maksimumo da okupitaj laborlokoj, kiu [kio] tamen ne signifas ke ĉiuj kiuj povas kaj volas labori havas laboron tutjare. Tian situacion oni rigardas neatingebla pro praktikaj kaŭzoj")

- ekstremo estas nesufiĉo de disponebla laborforto, "subdungiteco" (9-lingva: "situacio en entrepreno en kiu la

disponebla personalo ne sufiĉas por la laboro farenda" - do termino el mikroekonomiko (9-lingva: "studado de la ekonomia sistemo rilate al individuaj regionoj de aktiveco, ekz. entrepreno, mastrumado, prezoj ktp")

- "dungiteco" ne kovras ĉiujn. Celo = laboro por ĉiuj! (laboro, 9-lingva: "streĉado direktita al kontentigo de persona aŭ socia bezono [kontraŭe al ludo kaj sporto, kiuj en si mem kontentigas bezonon]")

- do: laborlokoj por la "profesiularo, profesia loĝantaro" (9-lingva: "ampleksas ĉiujn personojn en lando kiuj faras profesian laboron. Laŭ internacia uzanco oni (ankoraŭ) ne rigardas dommastruman laboron kiel profesian laboron") (9-lingva: "profesio = ĉiu okupo per kiu oni akiras vivrimedojn. Ĝi estas alia nocio ol la entrepreno, ĉar oni povas praktiki sian profesion memstare aŭ kiel dungito")

23 En ĉiuj antaŭaj kompletigoj de la konjunktura ondado ekzistis paraleleco inter la evoluoj de

- la malneta nacia produkto MNP kaj

- la dungiteco (pli korekte: laboreco [ĉar temas pri ĉiu ajn formo de monakira partopreno en la ekonomia cirkulado, do temas ne nur pri dungitaj personoj, sed ankaŭ pri memstaruloj, entreprenistoj ktp)

24 Fenomeno de la nuntempo estas bona konjunkturo kun samtempe ne neglektinde granda senlaboreco en pluraj alte evoluintaj okcidentaj landoj (Britio, Germanio)

- tamen mankas en tiuj landoj laborfortoj, kion pruvas arda bezono je kunlaborantoj en multaj branĉoj

- evoluo supren kun (ioma) inflacio, dum kiu tamen regas stagnado, ricevis de fakĵurnalistoj la nomon "stagflacio" (uzata en "Ekonomia Bulteno pri Usono", kajero de la 10-a de aprilo 1989, paĝo 1, 1-a paragrafo)

- konsekvencoj:

  * la bona konjunkturo estas ne kompleta

  * la atingita ekvilibro estas ne perfekta (9-lingva: ekonomia ekvilibro: "sur merkato indikas ke propono kaj postulo egalas. Krom ĉi tiu parta ekzistas la ĝenerala ekvilibro, pri kiu estas parolo, kiam en la tuta nacia ekonomio estas ekvilibraj rilatoj inter la diversaj var- kaj monfluoj")

  * la klopodoj por plibonigi la konjunkturon malhavas unu esencan elementon - apud zorgo pri la konjunkturo devas ekzisti ankoraŭ aliaj intervenoj

## 3 STADIOJ DE KONJUNKTURO

30 tipa evolukurbo *desegni*

- konjunktura fluktuo (PIV: neoficiala) (9-lingva: "la transiro de unu periodo al la alia en la ondado de la ekonomia aktiveco")

301 bonfarto (la kulmina punkto de la kurbo) aŭ la alta konjunkturo (angla: boom) (9-lingva: "periodo de ekonomia florado")

302 konjunktura lantiĝo (9-lingva: "tiu periodo en la ondado de la ekonomia aktiveco en kiu prosperkresko stagnas aŭ ŝanĝiĝas en malkreskon")

303 deflacio (9-lingva: "la malo de inflacio. Prezoj kaj enspezoj de mono malaltiĝas, kion akompanas plivaloriĝo de mono")

304 depresio (la nadira [de Zamenhof] punkto de la kurbo, la malkulmino) (9-lingva, same:" malalta konjunkturo: ĝin karakterizas granda senlaboreco, malaltaj ciferoj de produktado kaj tial malaltaj enspezoj kaj prezoj")

305 krizo (9-lingva: "grava malordiĝo de la ekonomia vivo, speciale ŝanĝiĝo de la alta konjunkturo")

306 marasmo (9-lingva: "plena senaktiveco"), (PIV, oficialigita en listo n-ro 2)

307 konjunktura reviviĝo (9-lingva: "tiu periodo en la ondado de ekonomia aktiveco en kiu malkresko de la prospero transiras en kreskon")

308 <u>periodo de realtiĝo</u> (9-lingva: "pri konjunkturo: la periodo en kiu malalta konjunkturo ŝanĝiĝas alta konjunkturo")

309 <u>reflacio</u> (9-lingva: "la periodo de la restarigo de la ekonomio post depresio tamen antaŭ ol stadio [PIV: klare distingebla tempoparto, prezentanta difinitan gradon de iu evoluo, oficialigita en listo n-ro 1] de plena dungiteco kaj inflacio, akompanata de altiĝantaj prezoj, estas atingita")

310 tiel daŭrante la evoluo alproksimiĝas al sia pinto (komparu ciferon 201).

311 La revigliĝo de la konjunkturo estas kutime akompanata de prezaltiĝoj:

- <u>inflacio</u> estas ilia nomo (inflacio, 9-lingva: "estas kondiĉo en kiu la aĉetpovo (enspezoj esprimitaj en mono) estas neproporcie pli granda ol la kvanto da disponeblaj varoj kaj servoj, tiel ke la valoro de la mono malpliiĝas")

    # inflacio kiel "normala" fenomeno (prezaltiĝoj inter 1 kaj 4 procentoj ankoraŭ akcepteblaj)

    # malagrabla inflacio forte kontraŭbatalata de la ekonomia politiko (prezaltiĝoj inter 5 kaj 10 procentoj)

    # inflacio kiel grava malsano (misfunkcio) de la ekonomio kun detruaj efikoj

    # hiperinflacio, PIV: "hiper = scienca prefikso signifanta: super la normala

kvanto"; la normala ekonómia vivo ĉesis, elpagitoj kuras kun kofroj kun monbiletoj al la bakisto por tuj aĉeti unu panon
= elturniĝo;: la homoj uzas tute ĝenerale fremdan (ne inflacian) valuton

- <u>elspeza inflacio</u> aŭ <u>postula inflacio</u> (9-lingva: "grandega aĉetemo de la publiko kaj la industrio, ĉar oni timas prezaltiĝon kaj mankon de varoj, ekz. kiam minacas milito")

- <u>salajra inflacio</u> (9-lingva: "estas formo de kostinflacio kaj okazas kiam la salajronivelo, esprimita en mono, plialtiĝas pli rapide ol la laborproduktiveco. La parton de la salajroplialtiĝo kiu ne pageblas el la pliiĝo de la produktiveco la dungantoj ne povas aŭ ne volas pagi el sia profito, sed pagigas per siaj aĉetantoj, kio povas konduki al plialtiĝo de la ĝenerala preznivelo, do al reduktiĝo de la reala salajro")

- <u>inflacia spiralo</u> estas nomo por la sin fortiganta proceso de inflaciado (9-lingva: "estas plialtiĝemo de la prezoj, kiu estas parte la rezulto kaj parte la kaŭzo de plialtiĝo de salajroj kaj aliaj enspezoj, kiel profitoj, dividendoj kaj rento")

- el la interligitecoj de var- kaj labormerkatoj povas rezulti la "spiralo de salajroj kaj prezoj" (9-lingva: "la alternaj plialtiĝoj de salajroj kaj prezoj, kiuj rezultas, unuflanke, el la

prezaltiga efiko de plialtiĝo de la salajra nivelo, aliflanke el la premo supren sur la realan salajron sekve de prezaltiĝoj")

- "stagflacio" (vidu ciferon 24)

312 nun la evoluo ripetiĝas, vidu ciferon 301

31 aspekto de la konjunktura kurbo en modernaj okcidentaj (= kapitalismaj) socioj: baza linio ĉiam altiĝanta, ĉirkaŭ ĝi osciladoj, do:

- fortaj kreskoj kaj

- malfortaj pliboniĝoj

  - eventuale: ioma regreso (PIV, de Zamenhof)

4 HIPOTEZO PRI KRIZO
(hipotezo, PIV: "nepruvita supozo, provizore akceptata por klarigi kaj komprenigi konstatitajn faktojn, sed kontrolota per pluaj eksperimentoj")

- unu aparta sed registrinda kritika alrigardo por pliprofundiĝi en la teoriajn aspektojn de la ĉi tie traktata temo

411 krizo kiel ŝlosila kontraŭargumento kontraŭ naciaj ekonomioj kun merkatmekanismo (9-lingva: "la karaktero de kunmetiteco kaj funkciado de la merkato, kaj la maniero laŭ kiu la diferencaj elementoj efikas unu sur la alian")

412 plej grava kritika skolo, eĉ oficiala en pluraj ŝtatoj kun disĉiploj en la tuta mondo: la marksismo (9-lingva: "teorio de la germana filozofo kaj ekonomikisto K. Marx, laŭ kiu la realiĝo de la socialismo estas rekta sekvo de la evoluado de la sociaj fortoj, ĉe kio la klasbatalo estas decida faktoro. La kerno de la marksisma filozofio (historia aŭ dialektika materiismo) estas la evoluado de la produktofortoj kiel materia bazo de la socia (jura kaj politika) supra strukturo, ĉe kiu en iu stadio de la evoluado ĉi-lasta iĝas kontraŭa al ili"), en tiu lekciaro enŝovita ne kiel lernota materialo, sed por pliklarigi la okazaĵojn ĉirkaŭ la konjunkturo

42 konjunkturo kiel ĉi tie la sola objekto kun rilato al la temo. Ĝia evoluo laŭ Marks:

421 dum krizo

= halto de ĉiu ekonomia aktiveco
tamen aperas novaĵoj

= teknikaj kaj sistemaj eltrovaĵoj
  = la teknika progreso pelas la evoluon antaŭen!
unue kelkaj, poste pli da entreprenistoj ekhavas esperojn pri pli bona ekonomia estonteco

- ne ke la homamasoj aĉetos konsumvarojn

- sed ke aliaj entreprenistoj aĉetos produktilojn

kaj la produktado pligrandiĝas

422 La debito kreskas (germane: "Absatz", 9-lingva: "facila detala aŭ pogranda vendado de varo; serĉateco de varo")

# la salajroj ne jam plialtiĝas en tiu unua ŝtupo de la evoluo al pliboniĝo

# la entreprenistaj enspezoj, la profitoj, kreskas

  - ĉiuj profitoj kune en absoluta kvanto = la profitsumo

  - ankaŭ la profito kiel procentaĵo de la enmetita kapitalo ĉe ĉiu unuopa entreprenisto
    = en marksisma terminologio: la *profitkvoto* (PIV: "rilato de la

plusvaloro al la tuta kapitalo", plusvaloro [PIV: "laboro, kiun la kapitalisto alproprigas al si senpage, egala al la diferenco de la sumigita laboro de produktantaj salajruloj kaj la salajro prezentanta nur la kostojn de reproduktado de la varo 'laborforto'"])

423 La laborforto estas nun ege bezonata. Laboristoj estas pli multnombraj kaj pli bone pagitaj.

Kreskas:

- la lukrita enspezo (9-lingva: "enspezo kiun oni akiras per laborado"), tial
- la salajrosumo, kaj kun ĝi
- la aĉetpovo (9-lingva: "la kvanto de varoj kiujn oni povas aĉeti per monunuo, ankaŭ nomata la interŝanĝa valoro de la mono; la eblo de persono aŭ grupo aĉeti varojn depende de la mezuro de enspezaro kaj havo")

la konjunkturo akceliĝas

424 la kreskantaj salajroj kreas danĝeran fazon (marksistoj diras: *altaj salajroj estas la albatrosoj* [Sturmvögel] *de la krizo)*

Kaŭzo: la plusvalora teorio (9-lingva: "unu el la fundamentaj ekonomikaj teorioj de Karl Marx, laŭ kiu la laboro, kiel ekskluziva produktiva faktoro, je ĉiu ŝtupo de la evoluo

povas ĝenerale produkti pli multe ol tion kio estas necesa por la daŭrigo kaj reproduktado de laborforto [subteno de la laboristo kaj lia familio] je tiu donita ŝtupo de evoluo")

Tiun plusvaloron la kapitalistoj forprenas de la laboristoj

# kapitalismo (9-lingva: "la tuto de ĉiuj fenomenoj de la kapitalisma metodo de produktado, kiu karakteriziĝas per privata proprieto de la produktiloj kontraste kun, ĉi-rilate, senhava laboristaro, dum la stato de la tekniko praktike malebligas aplikadon de laborforto sen ofte ampleksaj, komplikaj kaj altvaloraj iloj. Tiel la produktiloj akiras la karakteron de kapitalo") (PIV: "ekonomika reĝimo, en kiu la produktorimedoj apartenas al privataj kapitalistoj")

# kapitalo

= (9-lingva: "komplika nocio, kelkfoje signifanta; 1] monkapitalo, t. e. kvanto da aĉetpovo per kiu la proprietulo povas akiri kapitalrenton; 2] materiaj investaĵoj aŭ produktitaj produktiloj")

= (PIV/la difino signita kiel "marksismo": "valoraro [produktiloj, laboroforto kaj mono], kiun proprietulo ne uzas por sia persona laboro kaj kiu kreas plusvaloron, dank' al la fakto, ke ĝi estas monopolo de la ekspluatanta klaso");

> konstanta kapitalo = produktiloj, krudaĵoj, helpmaterialo,

> varianta kapitalo = konsumiloj de la salajruloj, valoro de la laborforto;

> kapitalisto = homo kiu utiligas sian kapitalon por havigi al si renton laborigante proletojn

en marksismo la maŝinaro estas imagita kiel senfrukta, kiel neproduktiva kapitalo (9-lingva: "kapitalo ne uzata, ekz. ne produktanta renton") - tiu vortaro parolas pri "ne uzata" kapitalo, dum marksismo difinas, ke parto de la aktive laboranta kapitalo ne kontribuas al la rezulto

- do la entreprenrezulto (9-lingva: "la profita aŭ malprofita diferenco inter enspezoj kaj kostoj de entrepreno") venas en marksismo nur el la valoro de la laborforto

  = tiu ekskludo de produktiveco de maŝinoj (produktiva, 9-lingva: "kapabla produkti; fruktoporta; multe produktanta; profitdona") estas bazo por la specifa atribuado de entreprenrezulto nur al la laboristoj, el kio la entreprenisto forprenas parton

    * kontraŭ tio: entreprenista enspezo, entreprenista salajro (9-lingva: "estas la enspezo kiun ĝuas entreprenisto pro sia gvidado de la entrepreno. Ĝi konsistas el la

malneta ["brutta"] enspezo super la kostoj. En la plej vasta senco la entreprenista enspezo ankaŭ ampleksas terrenton kaj kapitalrenton, se la entreprenisto estas kunproprietulo de la tero kaj kapitalo en la entrepreno, kiel ankaŭ entreprenistan salajron, kiun oni povas rigardi kiel laborsalajron por gvidaj kaj organizaj laboroj")

425 pro tiu aksiomo (PIV: "aserto, rigardata kiel evidenta per si mem aŭ ĝenerale akceptata; aserto apartenanta al certa aro da asertoj, kiujn oni ne pruvas, sed el kiuj sekvas per matematikaj pruvoj ia teorio", vorto oficialigita en listo n-ro 2) pliakriĝas la batalo pri distribuado (9-lingva: "1] la movado de varoj ekde la produktisto al la konsumanto fare de la komerco, 2] en senco de porciumado: efika disdivido de maloftaj varoj en la intereso de la nacia ekonomio kaj ties diversaj sekcioj en malfacilaj periodoj kiel milito kaj naturkatastrofo")

- plialtiĝantaj salajroj, eltranĉitaj el la entreprenrezulto, necese malsuprentiras la plusvaloron

- povas ankaŭ esti, ke la tre bona konjunkturo kaŭzas tre grandan kreskon de la entreprenrezulto

  # tiel ke la sumoj de ĉiuj profitoj ankoraŭ kreskas (malgraŭ kresko de ankaŭ la salajroj)

  # sed ke la procentaĵo de rento je la

enmetita kapitalo tamen malkreskas
= asertita aŭtomata evoluo, la *"leĝo pri la falanta profitokvoto"*

426 la kapitalisto perdas pro tro malalta profitokvoto (rentoprocentaĵo) la intereson investi plue: falas la debito de produktiloj. Ankoraŭ floras (pro la altaj salajroj) la debito de konsumvaroj

427 sed jam okazas maldungoj. Senlaboruloj ne plu multe konsumas. Malaltiĝas la debito, nun falas ankaŭ la vendeblo de konsumvaroj. La aĉetpovo kolapsas. Tial pli da laboristoj fariĝas senlaboraj

- la ankoraŭ dungitoj ne sukcesas pri adekvataj salajroj, premas sur la labormerkaton la "rezerva armeo de la senlaboruloj" (laborista rezervo, 9-lingva: "la nombro da senlaboruloj kiu estigas la elastecon de la propona flanko de la labormerkato, el kiu la industrio kaj la publikaj servoj povas ĉerpi laŭbezone")

- la senlaboruloj malbonfartas

- tiuj du homgrupoj = la laborista klaso vivas en ekstrema mizero
  = paŭperismo (PIV: "socia fenomeno karakterizita per la tre granda malriĉeco de pli-malpli granda parto de unu nacio")

428 la ekonomio troviĝas en krizo, multaj entreprenoj bankrotas sed iuj postrestas

- okazas koncentrado (9-lingva:

"evoluo en la direkto de grandindustrio, precipe per fuzioj de entreprenoj aŭ de interesoj [kartelo]") Ankaŭ ekzistas koncentrado de kapitalo kiel rekta akumulado. (PIV: "uzi parton de la plusvaloro ne por persona konsumado, sed por pligrandigo de la produktiga kapitalo"). La marksismo opinias tion leĝo

429 post koncentrado (nun kun malpli da kapitalistoj) la evoluo rekomenciĝas

rimarko: pli da marksisma teorio transpasus la limojn de la temo *konjunkturo*, ankaŭ la refutado ne necesas ĉi tie, tamen kelkaj kritikoj:

- aksiomoj ne trafas la realon

- aŭtomatismoj estas kontraŭbataleblaj per ekonomia politiko

- sindikatoj malhelpas malriĉiĝon (sindikata movado, 9-lingva: "estas formado de organizoj de personalo en entreprenoj kun la celo akiri aŭ konservi bonajn laborkondiĉojn kaj plialtigi la kulturan nivelon de la membroj", sama difino por "personalsindikato")

## 5 POLITIKO KIEL INFLUILO

### 51 sorto aŭ manipulaĵo?

- sinteno ĝis proksimume 1930: konjunkturo estas neevitebla sorto, nepra akompanaĵo de la kapitalisma sistemo, forigi la ciklojn (inkludantaj malbonstatojn!) eblas nur per forigo de la tuta kapitalisma sistemo (io tia ankoraŭ hodiaŭ aŭdebla el socialismaj landoj)

- aserto (i.a. de sciencistoj) ke parte la ŝtatgvidantoj mem kulpas pro malsaĝa manipulado pri monkvanto kaj moncirkulado

- ekde 1930 la kompreno ĉe politikistoj, ke eblas ion entrepreni kontraŭ malbona konjunkturo: ekz. politiko de Roosevelt

- poste la ĝenerala konvinko ke stirado de la ekonomio tra la konjunkturo estas tasko de la ŝtato, ekz. en FRG "Leĝo por la certigo de monstabileco kaj kresko de la ekonomio" de la 8-a de junio 1967

- nun la konjunkturo estas subigita al ŝtata influo, kio tamen ne signifas, ke ĝia oscilado estas komplete venkita

521 influo super la ekonomio: *ekonomia politiko* (9-lingva: "estas ĉia konscia interveno en la libera disvolviĝo de la ekonomiaj rilatoj, ordinare en la kadro de difinita sistemo de rimedoj aŭ strebado kun pli ampleksa celo")

522 influo super la antaŭe menciita kurbo: *konjunkturpolitiko*
najbaraj kampoj en la ekonomia politiko:

- aparta politiko por zorgi pri plena dungiteco (ĉar ekzistas samtempe senlaboreco kaj manko de laborfortoj!)

  = vidu ciferon 2 de tiu ĉi dispozicio, laborstabiligo (9-lingva: "politiko laŭ kiu oni plejeble multe igas la laborlokojn en la industrio k. s. daŭraj kaj regulaj")

  # transkapabligo de laboristoj

  # plukvalifikado de laboristoj, profesia pluperfektigo (9-lingva: "perioda ĝisdatigo de la faka scio de inĝenieroj, instruistoj, kuracistoj kaj similaj profesiuloj, kiel ankaŭ de personalo en la industria kaj komerca entreprenoj. Tiu ĉi ĝisdatigo ofte necesas pro la rapida malnoviĝo de scio")

  # direktado de junuloj en profesiojn kun ŝancoj por la estonteco (rimedo pridubata en liberalismaj ŝtatoj)

  # plifaciligoj dungi (kio povas inkludi la plifaciligon maldungi)

  # stimulado al malfermoj de propraj entreprenoj

  # kreo de novaj laborformoj

  # rekono de plej diversaj formoj de laboradoj

- strukturpolitiko (detale traktita dum SUS 5 en 1988 en lekciaro *"Ekonomiaj agadkampoj de metropoloj"* de la sama aŭtoro)

- regiona politiko

- aliaj ne ĉiuj mencieblaj

53 difinoj:

- *konjunktura politiko* (9-lingva: "ĝin povas plenumi la registaro por niveli la konjunkturondojn, por ke daŭre ekzistu plena dungiteco kaj ne okazu monaj perturboj")

- *politiko de plena dungiteco* (9-lingva: "politiko kiu celas al plena dungiteco. En periodoj de malalta konjunkturo kaj granda senlaboreco la registaro povas stimuli privatajn elspezojn kaj plialtigi siajn proprajn elspezojn. En ambaŭ kazoj pligrandiĝo de la investoj havos rektan, pligrandiĝo de la konsumado nerektan efikon sur la dungitecon"

54 la du direktoj en la konjunkturpolitiko:

- s t i m u l a d o kaj

- b r e m s a d o

* desegni *

metodo de klarigado: demonstrado en modelo de evidentaj (ekstremaj) evoluoj

55 landoj en kiuj aplikeblas konjunkturpolitiko

= politiko por ne havi senlaborecon kaj por forigi ĝin kiam jam ekzistanta

= politiko por teni la valoron de la propra valuto plejeble stabila

du tute ĝeneralaj problemoj troveblaj en ĉiuj ŝtatoj de la mondo!

* alte evoluintaj industriŝtatoj kiel la membroŝtatoj de la Eŭropaj Ekonomiaj Komunaĵoj, la nordamerikaj ŝtatoj, Japanujo ktp senĉese aplikas la konjunkturpolitikon

* la socialismaj landoj ne restis liberaj de ekonomiaj malagrablaĵoj, kvankam koncerne konjunkturon ilin ne trafis ĉiuj facetoj

  - la bonfarto senteble varias, ĝi pliboniĝas, sed enŝoviĝas ankaŭ malfortaj fazoj

  - la monvaloro ne restas stabila, ankaŭ en la formo, ke iuj bazaj varoj restas malkaraj, sed aliaj varoj rariĝas kaj estas haveblaj nur kontraŭ pli da aŭ kontraŭ alia mono

  - senlaboreco ekzistas kvankam ĝi povas resti nevidebla / superfluaj laboristoj en fabrikoj kiuj estas ne maldungeblaj

* "tria mondo"

  - sojlolandoj (troviĝantaj "sur la sojlo" inter industria kaj evoluanta landoj) kiel ekzemple suda Koreo nepre bezonas politikon de stirado tra la konjunkturaj fazoj, kiuj ĉe ili estas pli akraj kaj pli ŝanceliĝemaj

  - evolulandoj (aŭ laŭ 9-lingva: evoluigendaj landoj) (9-lingva: "estas tiuj landoj kie la vivnivelo, esprimita kiel enspezaro per kapo de la loĝantaro, estas konsiderinde sub tiu en industriŝtatoj. Distingo inter evolulandoj kaj evoluintaj landoj povas baziĝi sur subjektivaj konsideroj")

    + laŭ terminologio de Unuiĝintaj Nacioj "LDC" la "malpli multe evoluintaj landoj" kiel Brazilo, Ĉinujo

    + en la sama terminologio la "LLDC" la malplej multe evoluintaj landoj"

  ambaŭ bezonas politikon de kreo de laborlokoj kaj de kontraŭbatalo kontraŭ inflacio, do konjunkturpolitikon

## 6 PSIKOLOGIAJ KLOPODOJ

Grava elemento rilate la konjunkturon estas la ĝenerala opinio de la homoj pri la ekonomia situacio. Decidas pri pozitiva aŭ negativa sinteno koncerne ekonomiajn aferon ankaŭ - kaj ne laste laŭ signifo! - la humoro (en PIV: vorto kun *), la animstato de la civitanoj tute ĝenerale. Eble la efektiva stato estas laŭ ĉiuj konstateblaj faktoj senesperiga, sed kiam regas ĝenerala optimismo, la problemoj estas venkitaj. Aŭ envere ĉio estas en plej bona ordo, sed la homoj rigardas en la estontecon kun pesimismo. Necesas efiki super la ĝeneralan humoron.

7 MONPOLITIKO

(9-lingva: "tiu parto de la ekonomia politiko, kiu klopodas influi la ekonomian proceson ŝanĝante la amplekson de la monkvanto [la monfluo] kaj de la cirkulrapideco. Ĝin faras la mon-instancoj")

71 mono en nacia ekonomio signifas

- kvanton kaj

- cirkulrapidecon

  + moncirkulado (9-lingva: "rondirado de mono, de mano al mano, de konto al konto ktp")

  + cirkulrapideco (9-lingva: "de la mono estas la nombro da fojoj laŭ kiu la mono moviĝas de unu posedanto al alia en difinita periodo. Plialtiĝo de la cirkulrapideco signifas pliiĝon de la servoj kiujn faras la mono en la interŝanĝado en la koncerna periodo")

  + monresanigo (9-lingva: "ĝenerale estas rekonduki al pli normala nivelo mon-cirkuladon kiu estas supermezura kompare kun la disponeblaj varoj kaj servoj")

  + mon-amasigo (9-lingva: "okazas kiam la monposedantoj portempe eltiras parton de la monkvanto el la cirkulado, kvankam ĝi kompreneble restas parto de la statistika monkvanto. Ekzemploj: ŝparita mono kaj saldoj en kontoj kurantaj, per kiuj oni ne faris pagojn dum longa tempo")

72 ĝiaj du direktoj:

- inflacia politiko (9-lingva: "ĝin la registaro aplikas klopodante pligrandigi la monkvanton kaj/aŭ la cirkulrapidecon de la mono proporcie al la varoj kiuj troviĝas en la ekonomia cirkulado")

- deflacia politiko (9-lingva: "ĝenerale signifas ke la registaro klopodas redukti la monkvanton aŭ/kaj la cirkulrapidecon de la mono proporcie al la varoj kiuj troviĝas en la ekonomia cirkulado")

  ˜ ambaŭ klarigoj de la 9-lingva vortaro apartenas al la monpolitikaj rimedoj de la konjunkturpolitiko. Tio estas nesufiĉa (vidu klarigojn en ciferoj 1012 kaj 1031 de tiu ĉi dispozicio), sed la difinoj ja taŭgas

73 la agantoj

- la direktantoj

  ˜ la ŝtato (registaro, financministro)

  ˜ centra banko / monkrea banko (9-lingva: "estas rajtigita de la ŝtato krei kaj cirkuligi bankbiletojn") ["monkreado", 9-lingva: okazas kiam difinitaj bankoj, la t.n. monkreaj institutoj, donas krediton aŭ aĉetas"] aŭ/kaj la ŝtato.

- de granda graveco estas la respektivaj potencoj de tiuj du direktantoj

- la centra banko povas esti

  > dependa de la ŝtato (de la financministro sed finfine pro la esenceco de tiu organo de la tuta registaro) - tio estas la "normala" kazo

  > sendependa (kiel en FRG)

- la komercaj bankoj kiel la

transmisiiloj

74 La principo: la centra banko influas la likidecon de la komercaj bankoj. Gi

- faras interezan politikon (9-lingva: "estas la plenumo de la monpolitiko de la monkrea banko per plialtigo kaj redukto de ties interezaj normoj" kaj samfonte "estas la influado sur la intereza normo fare de la registaro kaj de la monkrea banko"

  # intereza normo, 9-lingva: "la nombro da interezaj unuoj kiujn oni devas pagi ĉiujare por pruntepreno de 100 kapitalaj unuoj"

La centra (= monkrea) banko difinas

- ambaŭ elementojn koncerne la interezojn

  kaj

- la kreditkondiĉojn

de si mem en sia rilato al la komercaj bankoj.

Tiel ĝi kaŭzas ĉe ili

- plivastigon }
- malvastigon } de la kreditkvanto, do:

la kapablojn de la komercaj bankoj servi al siaj klientoj en la disponigado de kreditoj.

Du direktoj:

- pli facile akireblaj kreditoj stimulas la privatan ekonomion,

- malfaciligo de kreditricevo bremsas la ekonomian aktivecon

75 La rimedoj:

751 intereza politiko

* [rekta traduko el la germana: "diskontpolitiko", 9-lingva: "diskonto = procento deprenata de la nominala sumo de kredito, precipe ĉe aĉeto de kambioj", temas pri la interezo, kiun la centra banko postulas de la komercaj bankoj, kiam tiuj prenas krediton tie]

* [rekta traduko el la angla "intereza politiko"]

+ se la termino estas "diskontpolitiko", devas aldoniĝi la "lombardpolitiko" (9-lingva: "lombarda kredito = kredito kontraŭ movebla garantiaĵo", [germane: dinglich gesicherter Kredit, angle: credit against pledge of chattels, credit on security of personal property])

752 politiko laŭ la malfermita merkato (9-lingva: "parto de la monpolitiko de la monkrea banko, konsistanta el aĉeto kaj vendo sur la libera merkato de kambioj, ŝtataj valorpaperoj ktp kun la celo influi la valutan kurzon kaj la cirkuladon")

753 politiko pri deviga monrezervo. En iuj landoj (ekz. FRG) la komercaj bankoj devas posedi parton de siaj rezervoj en kontanta mono; kiomgrade regas tiu oficiala monblokado, ili ne povas doni kreditojn al siaj klientoj (la termino por la rezervigenda monkvanto: germane: Mindestreservesätze; en la lingvoj franca, angla, itala, nederlanda, dana, hispana kaj portugala [la aliaj lingvoj de la Eŭropaj Komunaĵoj krom la greka] estas uzata la vorto "deviga" aŭ "obligacia" en la dua senco de PIV, t.e. "jura devo doni, fari aŭ ne fari ion", fonto: "Glossaire en neuf langues" de la administracio de la Eŭropaj Komunaĵoj, IX/C/2 "Terminologie et Application Informatiques, Bruxelles")

754 kompreneble la centra (= monkrea) banko povas tute simple presi bankbiletojn aŭ senfine malfermi kontojn. Ĝi tiukaze agas komisie de la ŝtato. Tamen tio apenaŭ plu estas ekonomipolitika rimedo sed simple signo de rezigno pri ĉiu ajn ekonomia politiko

8 EKSTERLANDKOMERCA POLITIKO

(eksterlanda komerca politiko, 9-lingva: "la tuto da aranĝoj kiuj progresigas aŭ malhelpas la komercon kun la eksterlando")

81 la vojoj de influado al la konjunkturo:

- aŭ stimuli eksporton kaj bremsi importon
- aŭ lasi la eksportindustrion sen helpo kaj neniel kontraŭstari importon

82 agantoj: decidojn prenas la registaro, kaj pro tiuj ekonomipolitikaj elpaŝoj la individuoj de la ekonomia vivo devas sekvi la volon de la ŝtato

83 rimedoj de la eksterlandkomerca politiko:

831 valutopolitiko: ŝanĝoj de la deviza kurzo

- devaluto (9-lingva: "estas la subita redukto, laŭ registara dekreto, de la oficiala valoro de la propra valuto per difinita procento")

  # okazas ankaŭ valorperdo pro la konjunktura evoluo ne ŝtate decidita sed samefika: *deprecado* (9-lingva: "reduktiĝo de la merkatvaloro de valuto esprimita en unu aŭ pli da aliaj valutoj aŭ en monmetalo, ekz. oro. La plej granda diferenco inter deprecado kaj devaluto kuŝas en tio ke ĉe deprecado la valoro de la

propra valuto estas lasata al la ludo de propono kaj postulo sur la valutomerkatoj. Devaluto okazas laŭ decido de registaro")
(PIV: depreci = redukti la merkatvaloron de varo aŭ de valuto, esprimitan en unu alia valuto aŭ en oro. Deprecado = tia reduktiĝo", atenton! 9-lingva "deprezi [kaj amortizi] = administracie redukti periode la valoron de konstruaĵoj, maŝinoj, aktivaj ŝuldoj ktp, sekve de normala eluziĝo aŭ ekonomia perdo")

- revaluto (9-lingva: "estas plialtigo de la alparo de valuto kaj la malo de devaluto, kiu estas redukto de la alparo. Revaluton kutime kaŭzas granda pagbilanca pluso de la revalutanta lando, pluso estiĝinta tial ke pli da varoj kaj servoj estas eksportitaj ol importitaj")
  aldona materialo: ĉapitro 8 el "Valutoj" el "Eksterlanda Komerco"

832 devizopolitiko: ĝi estas aplikata kontraŭ posedo de kaj dispono pri devizoj:

- devizokontrolo (9-lingva: "estas kutime aplikata en ligo kun malofteco de eksterlandaj pagiloj sekve de konstanta pasiva pagobilanco")

- devizolimigoj (9-lingva: "ilin registaro ordinare aplikas pro malabundo de eksterlandaj pagiloj sekve de daŭre pasiva pagobilanco. Tiuj ĉi limigoj rilatas al akiro kaj emisiado de devizoj, do al la tuta eksterlanda pagotrafiko")

833 eksterlandkomerca politiko

- manipulado pri doganoj
- kontingentado (9-lingva: "kontingento = 1] kvanto, nombro aŭ parto kiun oni devas ĉiufoje liveri, 2] maksimuma kvanto da difinitaj varoj kiun oni rajtas importi en fiksita periodo")

aldona materialo: ĉapitro 6 "Protektado" el "Eksterlanda Komerco"

834 ĉio ĉi tiras post si kapitalfluojn trans limojn, i.a. vagabonda kapitalo (9-lingva: "estas neuzataj monmerkataj rimedoj kiuj fariĝas neaktivaj pro ekonomia depresio kaj serĉas portempan investiĝon eksterlande, nome tie kie la kondiĉoj estas pli favoraj") - interplektiĝo de *monpolitiko* kaj *eksterlandkomerca politiko*

84 efikoj de stimulado aŭ de bremsado de la konjunkturo

ĉi tie lokiĝu ĉapitro 16 "Efikoj" el "Eksterlanda Komerco" kaj parte ankaŭ ĉapitro 17 "Urboj"

## 9 BUĜETA POLITIKO

(buĝeto, 9-lingva: "prezento de la financa stato de nacio, institucio, asocio, entrepreno ktp por difinita periodo kaj bazita sur detalaj taksoj de planitaj aŭ atendataj spezoj dum tiu periodo") (9-lingva: buĝeta deficito, buĝeta pluso - "deficit spending" ne estas tie registrita)

91 kio estas buĝeta politiko?

La ŝtato povas (post psikologia konsilado aŭ eksterlandkomercaj rimedoj, eventuale post realigo de sia monpolitiko) tre rekte interveni ĉe la privataj ekonomianoj: per siaj monrimedoj!

- aŭ ĝi elspezas ilin kaj devas disponi pri ili en sia buĝeto

- aŭ ĝi ŝparas ilin kaj lasas ilin en sia propra dispono t.e. sia buĝeto

Ĉiun sian monon ĝi registras en sia *buĝeto*, de tio venas la nomo de tiu speco de konjunkturpolitiko

92 du direktoj de buĝeta politiko. La ŝtato povas

- aŭ esti pli malpli retenema pri ŝtata mono ĉe la individuoj de la ekonomia vivo. Tio estas
  - ˜ bremsi la evoluon aŭ
  - ˜ kontribui ke la ekspansia (PIV, de Zamenhof) proceso ne plirapidiĝu

- aŭ enpuŝi aktivadojn en la ekonomion kaj ĝian cirkuladon
  - lasi rimedojn ĉe la privatuloj aŭ doni freŝajn al ili por ke ili povu ion entrepreni
    > la privata sektoro ekagas
  - eventuale mem organizi laborojn (ŝtataj programoj de dungado)
    > la ŝtata sektoro de la ekonomio ekaktivas

- konjunkturcele sed ankaŭ ĝenerale, t.e. akceli la evoluon de la ekonomio kun la celo de pli kaj pli da bonfarto; tio estas "socialema ŝtato" (angle: welfare state, germane: Wohlfahrtsstaat) (9-lingva: "estas ŝtato kiu akcentas la stimuladon de la sociala kaj individua prospero de siaj loĝantoj, kutime per leĝigo de tiaj rimedoj kiel asekuro kontraŭ malsano kaj senlaboreco, minimuma salajro, loĝigado, pago de invalideco, aĝo kaj vidvinaj pensioj, senpaga instruado ktp")

  + ankaŭ stimulado de aĉetpovo (9-lingva: "la aĉetpovon oni povas stimuli per apogo de la loĝantaro kiuj, sen ĉi tiu apogo, ne povas transformi siajn bezonojn en aĉetpovan postuladon. Per impostaj rimedoj aŭ pruntado oni povas transdoni aĉetpovon de la pli bonhavaj al la malpli bonhavaj")

= interplektiteco de konjunkturpolitiko kaj ĝenerala ekonomia politiko

  - kiam la registaro jam influas la iradon de la nacia ekonomio, estas relative doni deziratan akcenton al tiu ĉi irado

- tio estus multoble pli komplike, se la stato de ekonomio estus tute senmova kaj la enpuŝo de la ĝeneralpolitikaj celoj estus la ekmoviĝo

931 Temas do pri ŝtata enmiksiĝo (9-lingva: "estas ĉiu enmiksiĝo de la registaro aŭ ĝiaj malpli altaj organoj en aferojn kiuj ne laŭ karaktero povas esti prizorgataj nur de la registaro. Oni parolas pri ŝtata enmiksiĝo en la ekonomian vivon, kelklande en la industrion ktp, sed la agadon de la registaro rilate al la nacia defendado, la justico k. s. oni kutime ne nomas tia").

Ekzistas intervenismo (9-lingva: "sinenmikso de la registaro en ekonomian terenon, kiun (kion) necesigas specialaj cirkonstancoj. Oni supozas ke la specialaj cirkonstancoj ne daŭras, tiel ke la sinenmikso povos ĉesi post iu tempo").

932 la teorian bazon donis antaŭ 50 jaroj Keynes, liaj tezoj "Keynes-ismo (tiel en 9-lingva. difino: "la ekonomiaj teorioj kaj programoj de la angla ekonomikisto J. M. Keynes, pli specife pledado por monaj kaj fiskaj programoj fare de registaro por pligrandigi dungitecon")

933 tio estas

* politiko de plena dungiteco, kiel jam citita en la punkto pri senlaboreco, kiel apliko de rimedoj por batali kontraŭ tion (ripete el 9-lingva: "politiko kiu celas al plena dungiteco. En periodoj de malalta konjunkturo kaj granda senlaboreco la registaro povas stimuli privatajn elspezojn kaj

plialtigi siajn proprajn elspezojn: En ambaŭ kazoj pligrandiĝo de la investoj havos rektan, pligrandiĝo de la konsumado nerektan efikon sur la dungitecon")

* kaj laborhavigo (9-lingva: "estas kreado de laboro, kutime publikaj laboroj, fare de la registaro por kontraŭbatali senlaborecon")

* kaj imposta politiko (9-lingva: "la politiko kiun registaro sekvas por influi la ekonomian evoluon per impostoj")

934 por tio utilas ekonomia planado (9-lingva: "estas konsiderado de tio kion oni volas atingi en estonta periodo kiel ankaŭ decidado pri la vojoj laŭ kiuj kaj la rimedoj per kiuj oni klopodas atingi la celon difinitan") -

tio povas pliintensiĝi ĝis gvidata ekonomio (9-lingva: "baziĝas sur la laŭplaneco, ĉe kiu la ekonomiaj agoj estas gvidataj. Gvidata ekonomio lasas larĝan marĝenon inter ekonomio ĉiurilate gvidata kaj iugrada libero, ĉe kiu la ŝtato intervenas nur se la rezultoj nedezirinde devias de iu difinita skemo") -

troigo estas paternalismo (9-lingva: "patreca prizorgado kaj ofte manipulado de homoj, speciale fare de ŝtato kaj dunganto rilate al ŝtatanoj kaj personalo, sen tio ke la homoj mem havas la rajton kundecidi")

93 konkretaj rimedoj:

* en la rilato inter la ŝtato kaj la privatuloj:

  - forpreni pli kaj pli grandajn partojn de la disponebla mono per impostoj (9-lingva: "imposti = leĝe meti imposton sur iun aŭ ion")
    ~ ĉe privatuloj = trafitaj estas salajroj kaj pensioj (la ŝtato influas la konsumadon)
    ~ ĉe entreprenoj = trafita estas la profito (la ŝtato influas la investadon)

  - lasi pli da mono en la ekonomio por stimuli konsumadon kaj investadon

  - plialtigi la salajron de la ŝtatoficistoj kaj la pensiojn

  - doni subvenciojn; ekzemploj:
    ~ eksportsubvencioj (ili kunigas rimedojn de la eksterlandkomerca kaj de la buĝeta konjunkturpolitikoj)
    ~ salajrosubvencioj (postenkreaj rimedoj, povas esti pagitaj ankaŭ de la laboroficejo, kiu ja same estas "la ŝtato"
      # ekzistas ankaŭ alicelaj subvencioj ekz. por plibonigo de la strukturo de la ekonomio per helpoj al teknologia progreso aŭ por egaligi la ekonomiajn statojn inter regionoj ktp

* kiel rekta memstara ŝtata aktivado: fondo de novaj aŭ aktivigo de

ekzistantaj ŝtataj entreprenoj por tie dungi senlaborulojn, rekta ŝtata politiko de laborkreo: ekzemploj: aŭtoŝoseoj, valbarieroj, sekigo de marĉoj por agrikultura landuzo ...

94 kiam la ŝtata mono sufiĉas, ĉio en ordo. Kiam ne?

En kazo de bezono (malalta konjunkturo!) tio estas la ĝenerala situacio, ja regas krizo kaj la impostoj alvenas malgrandkvante en la ŝtata kaso. Se tamen ŝtata elspezado estas la elturniĝo,

- la primitiva vojo estas monkreado

- la tute normala vojo estas havi la kuraĝon akcepti deficiton en la ŝtata buĝeto - *politiko de buĝeta deficito*

* estas malfacile konvinkiĝi ke en malbonaj tempoj, kiam la buĝeto ampleksas malmulton, necesas elspezi! Tial tiu ĉi vojo ŝajnis neirebla en pli fruaj tempoj. La registaroj volis ŝpari kaj tiel plifortigis la krizon
  * rakonti pri Germanujo post 1929 *

- kiam la konsilo al la ŝtato estas:
  ˜ trankvile akceptu ŝuldojn malgraŭ monmanko en malbonaj tempoj,
  tiam estas necesa konsekvenco por la sama ŝtato:
  ˜ en bonaj tempoj repagi la ŝtatajn kreditojn, do ne elspezi ĉiun monon por bonfaroj al la civitanoj = la elektontoj

## 10 EFIKECOJ DE LA RIMEDOJ

### 101 gradoj de efikeco

#### 1011 psikologiaj rimedoj

malfortaj efikoj, tamen ne eblas rezigni pri ili

#### 1012 monpolitiko

parte bonaj rezultoj, parte sensukcesa:

- por daŭre influi en la etaj ŝanceliĝoj de la konjunkturo iomete bremsante aŭ malforte stimulante tiu ĉi politike estas tre taŭga kaj tial konstante uzata kun bonaj rezultoj
- en ekstremaj pozicioj de la konjunktura evoluo la monpolitiko havas nur malmultan efikon;
  ekzemploj:
  - en peza krizo eĉ la plej malalta interezo ne povas instigi entreprenistojn tamen investi
  - ĉe fortega postulado en pinte alta konjunkturo ankaŭ tre altaj interezoj ne malhelpas pluan ekspansion

#### 1013 eksterlandkomerca politiko

efika kampo sed kun danĝeraj akompanaĵoj:

- eksterlanda komerco tuŝas ĉiujn partojn de la hejma ekonomio. Ĝin manipuli do trafas ne nur la konjunkturan fluktuon, sed multajn aliajn enlandajn fenomenojn

- ĉar per ĝi fremdaj landoj estas subigitaj al la enlanda (konjunktur-)politiko, kio preskaŭ ĉiam ne plaĉas al ili. La aliaj landoj aplikas kontraŭrimedojn, t.e. retorsioj (9-lingva: "pri komerca politiko: farado de protektaj disponoj por devigi la eksterlandon praktiki pli liberan komercan politikon. La lando nuligas la retorsiodisponojn tuj kiam ankaŭ la eksterlando ĉesigas sian protektisman politikon")

1014 buĝeta politiko

tre forta efiko, ne eblas, liberigi sin de tiu influo

102 pliintensigoj

- eksteraj faktoroj
  - la ekonomia politiko povas kaze de nesufiĉa efiko plifortigi la aplikatan rimedon
  - pluraj rimedoj estas samtempe uzataj
- imanentaj (PIV) faktoroj
  - en tio: la multiplikanto (9-lingva: "efiko de la sekundara influo de pliiĝinta dungiteco, investado ktp. kiu principe daŭras senfine, tial ke ĉiu kreskinta aĉetpovo, se uzata, kreas novan aĉetpovon ktp. La termino estas uzata speciale en ligo kun konjunktura politiko")

103 kie la ĉefa akcento?

1031 pli frue: monpolitiko; ĝi estis la sola akceptita rimedo, tial malnovaj

lernolibroj pri ekonomiko metas la tutan akcenton pri konjunkturpolitiko sur tiun ĉi kampon (evidente ankaŭ la 9-lingva vortaro; mia kunlaboro ne efikis en tiu ĉi punkto por konvinki la ĉefaŭtoron, la rezulto ne estas ke io estus vere malĝusta, sed monpolitiko ja estas nur unu parto de la tuta konjunkturpolitiko)

- tio estis komprenebla el la iama signifo de mono kiel la ekvivalento de ĉiuj produktitaĵoj (monsistemo, PIV: "difinas la valoron de la mon-unuo rilate al oro", do: oro kiel mono kaj monbiletoj nur rajtigiloj por or-ricevo - 9-lingva: "or-etalono [vorto ne en PIV] "ekzistas kiam la monkrea banko estas devigata interŝanĝi paper-monon kontraŭ oraj moneroj", kaj "etalona metalo: tiu nobla metalo kiu en lando estas la bazo de la mono")

- nun tio eksmodiĝis kaj ni havas "fidatan monon" (PIV: "propra materia valoro nula, akceptata pro fido de la publiko")
  # mono nun materia mono (9-lingva: "ĝin oni povas konservi en sia monujo, paperujo aŭ monkesto male al ĝirmono, t.e. mono, kiu estas nemateria, ĉar ĝi estas nur ero en la libroj de banko aŭ ĝirinstitucioj") + ĝirmono + konstanta kreditdispono de privatuloj per kreditkartoj + devizoj en enlanda normala cirkulado
  = la disponkapablo de la monkrea banko pri "sia" mono malfortiĝis

1032 nun esenca pozicio de la buĝeta politiko

ĉar

- ĝi tiel forte efikas

- nun la ŝtato tute ĝenerale ludas elstaran rolon en la ekonomia kunvivado

1033 tamen: diferencaj aplikoj por diferencaj kazoj

- monpolitiko havas la funkcion de korektanto en la kontinua fluktuo de la konjunkturo

- buĝeta politiko akiris la pozicion de la decida elpaŝo super la konjunktura evoluo

- ambaŭ formoj ne plu estas malhaveblaj en iu ajn ŝtato (apud ĉiuj aliaj rimedoj)

104 konjunkturo supervenkita?

1041 konjunkturo estas esenca konstato pri la stato de la ekonomio, alta konjunkturo grava ekonomipolitika celo.
Ĉu sukcesa?
Ja ekzistas tiom da rimedoj por stiri la ekonomion!

Ĉu eterna bonfarto anstataŭ nur ondado ĉirkaŭ ĝi?
Pro multaj faktoroj enharmoniigendaj, ĉiam restos ŝanceliĝoj, kaj ili moviĝos supren kaj malsupren
= tio ja estas la konjunkturo!

Ĉar konjunkturo estas ne forigebla,
necesas ĉiam pli bone glatigi ĝiajn
osciladojn.

1042 La konjunktura fluktuo ne plu estas la ĉion decidanta ekonomia fenomeno. Solvi ĝiajn problemojn ne sufiĉe helpas al la homoj, kiam ne same enordiĝas

- malnoviĝintaj ekonomiaj strukturoj
- malakordoj sur la labormerkatoj
- mankantaj ekvilibroj en eksterlanda komerco
- kaj la multaj aliaj menciitaj problemoj